



KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO

DE LA

KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO
KAJ DE LA INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ

JARABONO:

Eksterlande: 4 pesetoj
Enlande: 3 pesetoj

ADRESO:

València, 245 - BARCELONA

OFICIALA ANGULO

NI LABORU KAJ ESPERU

Kiam ni publikigis nian Alvokon al la katalunaj esperantistoj en la julio-aŭgusta numero de KATALUNA ESPERANTISTO ni timis, ke ni predikas al surduloj. Multajn jarojn ni vivis sur la estrara podio de nia organizo kaj la sperto certe multe instruis nin pri la sintenado de niaj enlandaj kunbatalantoj: tial ni ne antaŭguis facilan sukceson, eĉ ne supozis, ke indiferentuloj, klaĉantoj aŭ la eternaj opoziciantoj volos diri sian vorton pri la afero. Kaj efektive, la rezultato de nia Alvoko ne rompis la tradicion, kvankam ni ne povas plendi: tri novaj grupoj aligis siajn membrojn, t. e. Esperanto-Grupo Vic, Frateco el Vendrell kaj Esperanto-Grupo Ripoll.

Dank'al tio la nombro de niaj membroj kreskis de 171 ĝis 250. Sed ni ne povas esti kontentaj ankoraŭ. Nia Federacio povos fari nenion, ĝi ne povos pesi en la internacia movado, dum ne estos 500 membroj almenaŭ en la vicoj de K. E. F. Tia deziro ne estas fantazio. En nia lando troviĝas ja ne malpli ol 1,000 esperantistoj organizitaj en la grupoj, kiuj ne havas klasan karakteron, kiuj batalas por lingvo internacia sen altrudo de ia politika aŭ socia doktri-

no. Tial la tuta afero dependas de la kunlaboro de la amikoj de K. E. F. kaj ĝuste nun, antaŭ la komenco de la nova jaro, estas la plej oportuna momento por la batalo por nia afero.

Dum ni laboras por la bono de Esperanto, ni esperas ke la katalunaj esperantistoj laboros por la bono de K. E. F. La nova jaro estu bona por ĉiuj kaj fruktodona por nia afero.

SPECIALA KURSO POR PROFESOROJ

Ne estas sekreto, ke multokaze ni ne povas komenci kursojn pro manko de kompetentaj esperantistoj, kiuj konscie posedas la lingvon kaj kapablas gvidi kurson. De diversaj flankoj ni ofte ricevis inviton organizi kurson kaj la manko de profesoroj devigis nin rezigni la bonan okazon. Krom tio la grupoj mem ne ĉiam povas solvi kontentige la gvidon de la grupa kurso, kiun ofte prenas sur sin samideano kun granda bonvolo sed sen la necesa preparo por tiu tasko. Tiun mankon ni volas forigi per speciala kurso por kursgvidantoj, kiuj povos trovi la necesan materialon kaj la taŭgan planon por sukcese disvolvi la taskon al ili donitan.

La kurseto, sub la gvido de profesoro Delfí Dalmau, L. K. okazos de post la 12.^a de januaro, ĉiusembe, je la 19.30, en nia sidejo, València, 245. Ni invitas ĉiujn esperantistojn, kiuj volas posedi konscie kaj profunde la internacian lingvon, partopreni la organizatan kurseton. Se ni sukcesos, la profito ne estos por ni, sed por Esperanto.

RIPOLL: KONGRESURBO 1935

La Loka Kongreskomitato daŭrigas siajn taskojn por havigi al la katalunaj esperantistoj sugestan kongresprogramon. La Komitato facile sukcesis ĉe la lokaj korporacioj kaj societoj, kiuj promesis varman subtenon kaj kunlaboron.

Nun la tasko dependas ankaŭ de la esperantistoj en la diversaj katalunaj lokoj, kaj nur kun ĉies kunlaboro kaj kunhelpo la kataluna Kongreso de 1935 povos atingi plenan sukceson. La propagando ĉe la diversaj grupoj kaj esperantistaj medioj fariĝu vigla kaj konstanta. Oni pripensu, ke nia movado povos disvolviĝi glate kaj kontentige, se ni grandamase kunvenos dum Pentekosto en Ripoll por pristudi la plej taŭgajn vojojn por la propagando. La disa agado ne povas doni la frukton, kiun povas atingi harmonia kunlaboro. Tial estas necese, ke ĉiu jam nun decidu veturi al Ripoll.

Nova alvoko al la XVI.aj INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ

La Komitato de la XVI-aj Internaciaj Floraj Ludoj vin salutas kaj invitas partopreni la jenajn konkursojn.

ORDINARAJ TEMOJ

Originalaj Tekstoj

- I Originala versaĵo kantanta *Amon*.
- II Originala Ama verko en prozo.

Tradukitaj Tekstoj

- I Traduko de unu el la versaĵoj de la konata kataluna poeto Joan Maragall.
- II Traduko de la kataluna rakonto «Sobre la mandra...», de Prudenci Bertrana. Vidu n-rojn 200-201.

EKSTERORDINARAJ TEMOJ

- I Premio de la Urbestro de Ripoll, 100 pesetoj. Temo: Laŭvola.
- II Premio de la Prezidanto de K. E. F., 50 pesetoj. Temo: Laŭvola.
- III Premio de la Estraro de K. E. F., 50 pesetoj. Temo: Laŭvola.
- IV Premio de KATALUNA ESPERANTISTO. Dumviva abono al la gazeto. Temo: Kiel oni faras bonstilan versan tradukon.
- V Premio de la grupo «Paco kaj Amo», 50 pesetoj. Temo: Laŭvola.
- VI Premio de la grupo «Barcelona Stelo», 50 pesetoj. Temo: Laŭvola.
- VII Premio de «Heroldo de Esperanto» (ankoraŭ difinita) de valoro de proksimume 50 pesetoj. Temo: Laŭvola.
- VIII Premio de «Literatura Mondo», ekzemplero de *Enciklopedio de Esperanto*, ilustrita eldono, bindita en du volumoj. Temo: originala novelo.
- IX Premio de «Literatura Mondo», jarkolekto de 1932. Temo: Originala poemo.
- X Premio de «Literatura Mondo», jarkolekto 1934. Temo: Originala poemo.

XI Premio de «Esperanta Grupo Vic», 50 pesetoj. Temo: Komedieto kun kvin roloj.

XII Premio de «Espero Katolika», dujara abono al la gazeto. Temo adekvata al la karaktero de la gazeto.

XIII Premio de «La Pirato», 50 pesetoj. Temo: Kion, laŭ internacie aplikata kodo, bonedukita homo ne devas fari, eĉ se li estas petolulo.

XIV Premio de Esperanto Grupo Ripoll, 50 pesetoj. Temo: «Laŭvola».

XV Premio de Casino de Ripoll, 50 pesetoj. Temo «Laŭvola».

XVI. — Premio de «Cooperativa Econòmica Ripollesa», 50 pesetoj. Temo: Prozo aŭ verso laŭdanta la kunhelpadon.

Novajn premiojn kaj temojn ni anoncos en venontaj numeroj de KATALUNA ESPERANTISTO.

NOTOJ

I. — La aŭtoroj de la du premiitaj Originalaj tekstoj I-II, kaj tiuj de la du premiitaj Tradukitaj tekstoj I-II, ricevos ekzempleron de *Kataluna Antologio* de Jaume Grau Casas, verko rekompencita de la Esperantista Akademio.

II. — Al la aŭtoro de la plej bona teksto (versaĵo aŭ prozaĵo) el la kvar ordinaraj premiitaj verkoj, la Komitato aljuĝos la *Naturan Floron* kaj la rajton elekti reĝinon de la Festo.

III. — La verkoj konkursontaj devas esti verkitaj en bona Esperanto, kaj ne ankoraŭ eldonitaj.

IV. — La solena Festo de la XVI-aj Internaciaj Floraj Ludoj okazos en Ripoll dum la XVII-a. Kongreso de «Kataluna Esperantista Federacio».

V. — La manuskriptoj, kiuj portos surskribitan devizon, devas esti ricevitaj antaŭ la 15 de marto de 1935 ĉe la adreso de KATALUNA ESPERANTISTO, Valencia, 245, Barcelona, kun la jena alskribo: Sro. Sekretario de la Floraj Ludoj; kaj ili estos akompanataj de fermita koverto, kiu surhavas la saman devizon kaj entenos karton kun la nomo kaj adreso de la verkinto.

VI. — La verkoj premiitaj fariĝos propaĵo dum unu jaro de la Komitato de la Floraj Ludoj, kiu zorgos pri ilia publikigo sur KATALUNA ESPERANTISTO aŭ aliaj esperantaj ga-

zetoj. Permeson por reprodukto dum tiu unua jaro oni devas peti al la Redakcio de K. E.

VII. — Eventuala aljuĝo de «Subpremioj» nur signifas honoran mencion sen rajto al efektiva premio.

J. A. de Saldanha Carreira, prezidanto; Maria Elworthy-Posenaer, S. Alberich Jofrè, Eduard Capdevila; Joan Gili Norta, sekretario.

PETO AL LA GAZETOJ — Ni petas niajn kolegojn, ke ili publikigu nian alvokon por ke la konkurson partoprenu esperantistoj el la tuta mondo.

NE MALSAGĜU!

Estas granda eraro ke tiu kiu serioze laboras kaj deziras famiĝi pro sia profesio aŭ intelekta laboro, kaŝas sian esperantisman aŭ sian uzadon de Esperanto. Ni ĉiuj havas konatojn kiuj post esperantista batalado decidas, ne nur ĉesi siaflanke tian bataladon, sed ankaŭ atribuas al ĝi kulpon ke ili malprogresis aŭ ne progresis en agadoj profesiaj, sociaj, familiaj, intelektaj; kaj poste, tiuj batalintoj, eĝ ne volas utiligi Esperanton por sia profito profesia aŭ alia. Tiel agante oni ne nur kredigas ke oni persone eraris, sed ke oni opinias Esperanton maltaŭga kiel solvon por internacia lingvo; kaj neniu el tiuj agintoj por Esperanto tion opinias, sed ili simple decidas uzi sian tempon por celo pli devigata de momentaj kaj okazaj cirkonstancoj.

Ni eldiru tiun eraron por eviti ke novaj batalantoj ĝin faros. Se morgaŭ ili ne plu restos batalantoj por nia afero, ili restu saĝaj pri Esperanto, ili ne fariĝu malsaĝaj *fobuloj*, pasivaj kontraŭuloj.

La profunda opinio de ĉiuj konantoj de Esperanto estas ke la kulpo ke nia afero ne jam venkis ne apartenas al Esperanto, sed al stultuloj, kiuj ne vidas ĝiajn ecojn, laŭ bone diris en sia libro «L'homme stupide» la eminenta profesoro Charles Richet.

DELFI DALMAU

Esperantista Lingva Komitato-Akademio

Oficialaj Sciigoj de la Akademio (N^o 5. — Oktobro 1934.)

1. — Pro sia elekto kiel prezidanto de U. E. A., Sinjoro Généralo Bastien rezignis pri la ofico de direktoro de la Sekcio «Komuna Vortaro». Sro. W. Bailey estas elektita de la Akademio por anstataŭi lin.

2. — La Akademio elektis korespondantino Fraŭlinon Lidja Zamenhof, kaj korespondantoj Sron. Inĝenieron Dron. Orenco, direktoron de la Sekcio «Teknikaj Vortaroj», kaj Sron. R. Kreuz, direktoron de U. E. A.

3. — La Kongreso de Stokholmo, laŭ propono de la prezidanto de L. K., unuvoĉe esprimis la deziron, ke la naciaj asocioj klopodu por prezenti, kiel reprezentantojn de sia nacia lingvo en la L. K., la plej kompetentajn, kaj fidelajn al la Fundamento, el siaj samnaciuloj; ke la eldonistoj de periodaĵoj sendu unu ekzempleron de ĉiu numero al la Prezidanto de la L. K. kaj al la direktoro de la Sekcio de Kontrolo; ke la Akademio ricevu subvencion almenaŭ egalan al tiu, kun ĝi ricevis de I. C. K. antaŭ la reorganizo de U. E. A. (Laŭ tiu-ĉi deziresprimo, la nova komitato de U. E. A. decidis daŭrigi la subvencion al la Akademio).

4. — Dum la kongreso de Stokholmo okazis *kunsido de la L. K.* ĉeestis sinjoroj Generalo Bastien, Bonnevie, doktoro Couteaux, S-ino. Dresen, Sroj. Inĝ. Isbrücker, Jung, Lundgren, Prof. Dro. Migliorini, Nylén, Dro. Orenco, Rousseau, Setälä, Dro. Szilágy. Prezidis Sro. Nylén, vicprezidanto de la L. K. Estis aprobita prezentado de la deziresprimoj al la kongreso; estis pridiskutitaj la periodeco de la aldonoj al la Universala Vortaro, kaj la Teknikaj Vortaroj.

5. — La Sekcio de Kontrolo klopodis por trovi kunlaborantojn, turnante sin al la recenzistoj de la esperantistaj gazetoj, sed ne multe sukcesis. — Ĝi starigis normajn lingvajn diplomojn, kies celo estas determini relativan valoron de la lingvaj diplomoj disdonitaj de la naciaj asocioj aŭ institucioj. Tiuj-ĉi valoroj estos publikigataj en la jarlibro por 1935.

6. — La jarlibro de la Lingva Komitato kaj de ĝia Akademio por 1934 aperis. Ĝi entenas la liston de la L. K.-anoj, aranĝitan laŭ nacioj. Al la nomo de

Ĉiu L. K.-ano estas kunigitaj la datoj de lia naskiĝo, de lia esperantistiĝo, de lia elekto al la L. K., kaj eventuale de lia elekto al la Akademio. — Por ricevi tiun-ĉi jarlibron sin turni al la Centra Esperantista Librejo (11, Rue de Sèvres, Paris); prezo: 2 Fr. Frk.

La Prezidanto: M. Rollet de l'Isle.

LA VETO

Ili ludis «poker» sur la teraso de la kazino. Ili, t. e. la «posedanto de kurĉevalaro», la «grandkomercisto», la «privatulo» kaj la «grafo». Neniu el ili sciis, ĉu tio estas vere la ĝustaj «profesioj» de la tri aliaj; sed ili ne faris al si zorgojn pri tio. Tiel ili enskribis sin en la gastlibron, kaj la ludkartoj kaj la ĉevalkuradoj tiom okupis ilin, ke ne restis al ili tempo, por cerbumi pro aliaj aferoj.

La grafo miksis la ludkartojn, kaj kiam li disdonis, la sinjoroj ekparolis pri la junulino, kiu alvenis hodiaŭ, kaj kies blondan belecon ili ĉiuj estis rimarkintaj, kompreneble.

Viroj similas unu al la aliaj, kaj ĉi tiu kvaroj ne estis escepto: ekvidante belan virinon, ĉiuj havas la saman celon, kaj ĉiu kredas, ke li havas la plej grandajn ŝancojn. Do baldaŭ ekestis malgranda, amikeca disputeto inter nia kvaroj, kaj la grafo, kiu ĉiam fanfarone reliefigis sian «nerezisteblon» rilate virinojn, diris:

«Nu, bone; mi proponas al vi veton, sinjoroj: al ĉiu el vi mi pagos kvin mil frankojn, se hodiaŭ post unu semajno la bela blondulino ne estos la mia. Sed se, ĝis tiam, vi konvinkiĝis okulvide, ke mi venkis, ĉiu el vi pagos *al mi* kvin mil frankojn».

Kaj la veto estis akceptata.

* * *

Dum la postaj kvin tagoj nenio gravá okazis en tiu afero. La sinjoroj interkonatiĝis kun la belulino kaj formis ŝian ĉiaman sekvantaron. Sed preskaŭ ŝajnis, kvazaŭ la grandkomercisto estus la preferato. Al li ŝi donis plej ofte okazon, elspezi monon por ŝi kaj fari al ŝi multvalorajn donacojn.

La sesan tagon, je la matenmanĝo, oni vane atendis la ju-

nan sinjorinon kaj la grafon. Anstataŭe ĉe de la pordisto estis letero, per kiu la grafo informis la sinjorojn: li estis ekscianta, ke la sinjorino veturis al la proksima urbo por fari aĉetojn. Li do ankaŭ veturis tien, kvazaŭ hazarde renkontos ŝin kaj luos ĉambrojn por la sinjoroj en «Grand Hôtel» por la sekvanta nokto. Ili bonvolu aperi tie vespere kaj tiam ekscios kromajn detalojn.

La sinjoroj pasigis la tagon en komprenebla malkvieteco. Posttagmeze ili veturis al la urbo kaj vespere alvenis en «Grand Hôtel».

Tie denove atendis ilin letero: la grafo renkontis la sinjorinon kaj akompanis ŝin unue dum ŝiaj aĉetoj. Poste ili kune tagmanĝis. Por la vespero li aĉetis biletojn por teatro, kaj la nokton li pasigos kun ŝi en la ĉambro n-ro. 28.

La ĉambro n-ro. 28 troviĝis apud la ĉambro n-ro 29, kaj la ĉambro n-ro. 29 estis unu el la tri menditaj por la sinjoroj. Inter la n-roj 28 kaj 29 estis pordo, kiu ja estis ŝlosita, sed kiu, tamen, forte faciligis la observadon, tiel ke la sinjoroj, kompreneble, kuniĝis en la ĉambro n-ro 29.

Kaj fakte: ĉirkaŭ noktmezo la grafo venis hejmen kune kun la belulino, kaj ambaŭ kune iris en la ĉambro n-ro 28, kiu—tion estis esplorintaj la sinjoroj—estis rezervita por la grafo «kun edzino».

Tre longtempe la aŭskultantoj aŭdis klare la du konatajn de ili voĉojn. Unue laŭte—poste flustre. Kaj la postan matenon ili vidis—tra fendeto de la preskaŭ nerimarkeble malfermita pordo de la ĉambro n-ro 29—la grafon irantan braksub-brako laŭ la koridoro kun la belulino. Per la necesaj bruaĵoj li estis zorginta pri tio, ke la trio en la apudaj ĉambroj ne fordormis lian levigon.

* * *

Vespere la grafo alvenis denove en la kazino. La sinjorino ankoraŭ ne estis reveninta, kaj la tri sinjoroj jam atendis.

La grafo ricevis siajn dek kvin mil frankojn. Sed kiam oni postulis, ke li rakontu, li rifuzis: «Mi estas lacega kaj enlitiĝos nun!», li diris. «Morgaŭ matene vi ekscios, kiel mi ebligis la aferon. Bonan nokton!».

* * *

Dum la posta antaŭtagmezo la tri sinjoroj nur malfacile venkis sian miregon pri tio, kion ili eksciis:

La bela blonda sinjorino tute ne estis reveninta, kaj la

grafo malaperis hodiaŭ plej frue per la unua vagonaro. Sed li postlasis leteron por la tri sinjoroj, kaj tiu letero tekstis jene:

»Vi tri ruzuloj:

»La rimedo, per kiu mi gajnis la monon de mia veto, kostis al mi kvin markojn antaŭ tri jaroj kaj estas—atesto pri geedzigo, malpli falsa ol mia grafa titolo. Ĉar la bela blondulino estas — mia edzino, kaj per la sama veto ni gajnas dek kvin ĝis dudek mil frankojn ĉiumonate laŭ la sama maniero, nur ĉiam en alia loko...»

KARL MINOR

LUDWIG VAN BEETHOVEN

En la malnova Rejn-urbo Bonn je ia bela somervespero kune sidis kvar homoj en vigla konversacio.

—Diru, avinjo — vokis la juna, meditema knabino— ĉu kio estas la plej bela en la mondo, kio estas la plej alta, kiun povos atingi la homo tie sur Tero?

—La lumo! — respondis la blinda, maljuna sinjorino malĝoje—, tio estas la plej bela kaj plej belega el ĉio!

—Ne, la sono! — rediris la knabino—, la sono estas la plej bela!

Ĉi ĵus pensis al la kantado de patro, al la pian-fantaziaĵoj de l' frato, kiujn ŝi ĉiam entuziasme aŭskultis.

—Infanoj — audiĝis nun la dolĉa voĉo de la patrino—, la plej alta sur Tero estas la amo!

La junulo, kiu ĝis tiu momento silentis, skuis nekonsente la kapon:

—Sed patrino — li vokis seniluziigite—, la amo estas ja nur revo! Mi ne volas revii, mi volas agi, patrino! Ne, la plej alta, plej brila donaco estas la forto, la kreanta forto, kiu neniam ĉesas! Mi ŝatas ĝin pli alte ol lumon, sonon kaj amon. Mi povus ĉion malhavi, sed kreantan forton mi devas havi tiom longe kiom mi spiros!

La junulo, kiu parolis tiujn profetajn vortojn, estis Ludwig van Beethoven! Ne tre longan tempon poste, mortis lia panjo, kaj kun ŝi la plej bona, plej fidela amo, kiun li posedis, amo, kiu ĉiam klopodis, ebenigi kaj peri inter li kaj la incitigema patro, kiu neniam komprenis la filon.

Ludwig van Beethoven naskiĝis la 16an de decembro 1770 en Bonn; li devenis el tre muzik-talenta familio. Lia avo Ludwig (belgo de Antverpeno) okupis la ŝatatan oficon de kortega muzikestro en Bonn, lia patro Johann estis tie tenoristo de la elektora orkestro. Li estis facil-incitebla, sed boneca viro, kiu bedaŭrinde trinkis pli ol estis necese kaj tio maltaŭgigis lin por praktiki sian profesion. La rilatoj inter patro kaj filo estis, kiel ni jam menciis, ne bonaj, kaj la malĝojigaj impresoj de lia juntempo maldolĉigis la menson de la juna Beethoven; ili igis lin malkunul'-ema kaj li fariĝis malfacile alirebla. Ĉe sia patro, kiu jam baldaŭ ekkonis la grandan talenton de l' knabo, li ĝuis la unuan muzik-instruon, kiu nur celis eble plej rapidan evoluon de la juna talento por monprofita perlaboro. Poste liaj instruistoj, kiuj anis al la orkestro de la patra urbo, alternis en rapida sinsekvo. Ankoraŭ en pli postaj jaroj Beethoven plendis pri la nesufiĉa muzik-instruo, kiun li ricevis en juntempo; ankaŭ pri scienca klerigo oni ĉe li tute ne zorgis.

Kiel 11-jara infano li devis jam publike sin vidigi dum vojaĝo al Holando; lia pianludo kaj liaj fantazioj kaŭzis hejme kaj en fremdlando merititan sensacion. En la proksima jaro jam aperis liaj unuaj komponaĵoj presitaj. 1784 la dektrijara knabo estis dungita kiel dua kortega orgenisto en Bonn. Tri jarojn poste realiĝis lia kordeziro — li estis sendita al Vieno, konatiĝis kun Mozart kaj ĝuis kelktempe muzik-instruon ĉe li. Post lia hejmeniĝo al Bonn lia situacio pliboniĝis. En la kortega orkestro li ludis aldviolonon. Dum sia libera tempo li pliperfektigis sin pri pianludo kaj komponis diligente. Sed la vivo en Bonn tro enlimigis lin. 1792 li ree vojaĝis Vienon dank' al grandanimeca helpo de elektoro Makso Francisko, la frato de l'imperatoro Jozefo II. Majstron Mozart li bedaŭrinde ne plu vidis viva, anstataŭe estis permesita al li la instruo de Jozefo Haydn, kiu kapablis progresigi bonege lian talenton. Lia amata Vieno estiĝis nun lia dua patrujo, en kiu li daŭre restadis. Neniaj konsideroj ligis lin plu je la gepatra urbo; intertempe lia patro mortis, kaj ankaŭ la princ-elektoro kaj per tio lia ofico en Bonn ĉesis pro la malamika franca uzurpo en la lando. Nun li povis senbare kaj libere disvolviĝi.

Post finita studado ĉe Haydn kaj aliaj eminentaj instruistoj li estis du jarojn pli malfrue memstara. Rekomendoj kaj lia genia talento permesis al li eniron en la plej noblan societon en Vieno. Kiel perfekta artisto, virtuoza kaj komponisto li estis akceptita per malfermitaj brakoj kaj ĉie hono-

rata. Grandaj artist-vojaĝoj al Praho, Dreseno kaj Berlino plialtigis kaj konfirmis lian famon iom post iom. Oni klopodis baldaŭ allogi lin al Berlino, sed li nepre ne konsentis, fariĝi malfidela al la aŭstria ĉefurbo, kie li akiris certigan kaj estimatan oficon. Kaj nun, kiam li staris sur la supro de l' vivo, trafis lin terura malfeliĉo, turmenta aŭdo-difekto sin anoncis, kiu malebligis al li iom malproksimajn vojaĝojn, kaj kiu iom post iom tute surdigis lin. 1809 li estis vokita al Kassel kiel vestfalia muzikestro, sed eminentaj favorantoj, inter ili lia lernanto ĉefduko Rudolfo, lin restigis per vivodaŭra rento en Vieno. Nun la kreanta agado pli multe superis la praktikan agadon. En vintro li dediĉis sin al la societa vivo, al sia multnombra lernant—kaj amikaro, zorgis pri la prezentado de siaj verkoj. La tutan someron li pasigis sin retirante en proksimo de Vieno en la kamparon, entreprenante multajn promenadojn kaj komponante en la izoleco de la naturo. Kia kruela sorto, ke li povis aŭdi la sonondojn, trafluantajn lian internon, nur parte kaj ne klare, kiam li hejme provis pianludi tion, kion li en la libera naturo skribis sur paperon! Sed tiu por muzikisto preskaŭ ne superebla malhelpo estis por la potenculo ankoraŭ pli forta instigo, agante venki sian sorton.

Krom lia sufero ankaŭ la privata malgaja situacio ĵetis malhelajn ombrojn en lian vivon. En lia hejmo neniam zorgis kaj ne mastrumis amplene komprenema edzino, portante lumon kaj amon en lian malfacilan ekzistadon. Malagrablaj skandaloj atendis lin hejme, kiujn li ja mem elvokis pro sia nesperteco en la praktika vivo; ĉar li, bonkora kaj nobla kia li de naturo estis, adoptis la frivolan kaj nedankeman filon de sia mortinta frato. Tiu nevo Karlo kaj ties patrino malbonigis kaj maldolĉigis la lastajn jarojn de Beethoven. Ili per tio atingis malbonan famon en la rememoro de tiuj, kiuj konis kaj honoris la muzik-geniulon, sed kiuj ne sukcesis instigi lin, ke li forĵetu la zorgojn por tiu nevo, ĉar Beethoven nekompreneble amis lin tutkore.

La 27an de marto 1827—a mortis Beethoven post grava sufero en 57a vivojaro. Li postlasis krom multaj nepresitaj verkoj 138 presitajn: 9 simfoniojn, inter ili la faman 9an kun la finĉoro pri la «kanto al la ĝojo» de Schiller — koncertojn — kordinstrumentajn kvartedojn — oratoriojn — muzikon por «Egmont» de Goethe — multajn piansonatojn kaj sian solan operon «Fidelio», kiu prikantas la neŝanĝeblan fidelecon de la virino.

Lin mem nur pasante tuŝis senteca virina amo en ideala

formo. Ni memoru ĉi-tie je la granda, tre talenta kantistino Wilhelmine Schroeder, al kiu post longa kontraŭstaro fine estis permesite, kanti la rolon de Leonore en lia opero.

Anime plej proksime staris ĉe Beethoven certe Therese Brunswick, la hungara grafino, kiu jam kiel 14-jara knabino dum mallonga tempo estis lia lernantino. Tia muzik-leciono, kiun ricevis Therese Brunswick samtempe kun sia fratino Karlino kaj dum kiu la patrino de la junaj fratinoj ĉiam ĉeestis, daŭris ofte 5-6 horojn. La amikeco, kiu ligis la majstron kun la grafa familio, evidentiĝis daŭra. Ĉiam denove li estis invitita kiel gasto en la grafajn kastelojn kaj li skribis la belan kanton: «Mi pensas al vi» en la albumon de la fratinoj. Okaze de pli malfrua revido li dediĉis al la grafino Therese sian faman Fis-dur-sonaton. En la postlasaĵo de Beethoven oni trovis bildon de ŝi kun la surskribo: «Al la fenomenona geniulo — al la granda artisto — al la bona homo, de T. B.» Tiu bildo apartenas nun al la plej valoraj trezoroj de la unuiĝo «Beethovenhaus» en Bonn. Therese Brunswick ankaŭ restis needziniĝinta kaj poste sin tute dediĉis al socialaj bonfaroj. La verkojn de Beethoven ŝi ankoraŭ kiel 70-jarulino prezentis kun juneca entuziasmo.

«Mozart lernis de Haydn, Beethoven de ambaŭ, sed poste», diras la arthistoriisto Ch. Ceser, li mem trabatis al si la vojon. Estas en Beethoven titana aspirado kaj celado, kiu nin preskaŭ demone kuntiras. Se la menso, lacigita per la flugo, malleviĝas al la Tero, la kontraŭdiro de nia fina kaj senfina esteco kvietigigas en tiom pura elegio, en tiom nobla, virta doloro, ke la animo fortiĝas kaj ekenergiĝas al nova ago kaj ĝi kontraŭstaras kun ĉiela gojo al la eraro kaj konfuzo de la surtera vivo!»

La majstroverkojn de Beethoven kapablas elĉerpi nur perfekta artisto. Ili postulas altan komprenon, taŭgan studadon kaj specialan talenton, kaj oni ne ĝuu ilin senrespekte kaj diletante. Kiu trovas okazon, ĝui la verkojn de Beethoven artiste prezentataj en preĝejo, koncertejo kaj teatro, tiu sentos interne plej puran ĝojon, altiĝon kaj edifon kaj plibeligos kaj pliriĝigos sian vivon.

MARIA SCHÖTTL

Premiita en Vendrell.

BIBLIOGRAFIO

Esperanto-sigelmajkoj en 12 lingvoj. Sigelmajkoj kun propagandoteksto en la lingvoj angla, ĉeĥa, Esperanta, franca, germana, hispana, hungara, itala, nederlanda, pola, serbo-kroata kaj sveda. Trikolore presitaj. Ĉiu lingvo en aliaj koloroj. En folioj po ok markoj temantaj pri radio, trafikoj trans-oceana, aviada, fervoja kaj aŭtomobila, sporto, turismo kaj interna komerco. La tekstoj rilatas kun rilataj vinjetoj. 10 folioj (80 markoj) de unu lingvo kostas germ. mk. 0,55 100 folioj kostas germ. mk. 4,40, inkl. sendkosto. Eldonejo «Heroldo de Esperanto».

Huru leder man fortsättningskurser i Esperanto? (Kiel oni gvidas daŭrigajn kursojn en Esperanto?) Einar Dahl: Gvidilo por studgvidantoj. Numero 1 en la serio: Helplibroj de Sveda Esperanto-Federacio. Eldonis Eld. Soc. Esperanto, Stockholm. 40 paĝ., 12 × 18,5 cm. Prezo: sved. kr. 1:.-.

Sveda Esperanto-Federacio komencis eldonigi serion de praktikaj helplibroj por la organiza laboro. La unua libro pritraktas la organizon kaj la gvidon de daŭrigaj kursoj. Tiaj kursoj ofte ne havas la sukceson deziratan kaj tre ofte okazas, ke post fino de multnombre vizitata kurso por komencantoj ne multaj kursanoj daŭrigas la studadon kaj sufiĉe ellernas la lingvon. Bone organizitaj kaj lerte gvidataj daŭrigaj kursoj havas tre grandan signifon por la konstanta progreso de nia movado.

Ĉar la organizo de kursoj varias laŭ la landoj, la libro estas verkita en la sveda lingvo.

La librojn de la serio rajtas aĉeti je duona prezo la anoj de Sveda Esperanto-Federacio. Sendube la starigo de tiu serio montriĝos tre valora por la Federacio el pli ol unu vidpunkto.

La Esperanto-Klubo, de Ernfrid Malmgren. 48 paĝ. Eldonis Eldona Societo Esperanto s. p. r., Stockholm, Svedlando. Prezo 1 sved. kr.

La rapida evoluo de la Esperanto-movado en Svedlando ĉiel estas konstatebla. Sveda Esperanto-Federacio same kiel sveda Eldona Societo Esperanto povas raporti pri gravaj sukcesoj en la jaro 1933. Kaj ĉiuj por la ĝenerala evoluo necesaj detaloj ŝajnas samgrade disvolviĝi. Unu el la gvidan-

toj de la aktiva sveda movado estas Ernfrid Malmgren, sekretario de Sveda Esperanto-Federacio, kiu per la libro «La Esperanto-Klubo» celis plifortigi kaj pliaktivigi la lokajn Esperanto-grupojn.

La libro — uzebla ne nur en Svedlando sed en tuta Esperantolando — ne nur donas konsilojn pri fondo de Esperanto-klubo, sed antaŭ ĉio ĝi prezentas utilajn proponojn por la kluba vivo. Ofte montriĝas malfacilaĵoj en novaj kluboj — sed ankaŭ en malnovaj! — aranĝi la laboron de la klubo en amuza sed samtempe rezultoriĉa maniero. Por ĉiuj la libro estas valora. Sufiĉas tie ĉi menciigi, ke la enhavo temas pri fondo de klubo, funkciuloj, internaj kaj publikaj taskoj, modelo de protokolo kaj Esperanto-biblioteko. Krom tio stenografiita referato de tuta klubkunveno montras akurate kiel aranĝi.

Entute «La Esperanto-Klubo» estas vera fonto de bonaj ideoj por la esperantistaro.

«Lingva kvaronhoro». Lingvaj problemoj traktitaj kaj klarigitaj de P. Nylén. (En sveda lingvo).

La Stokholma Esperantogrupo de kelkaj jaroj praktikis ĉe siaj kunvenoj «lingvan kvaronhoron», kiam ĝia lingva spertulo, membro de Lingva Komitato kaj vicprezidanto de la Akademio Paul Nylén klarigis problemon, kiu povas doni malfacilaĵon al la nelertaj esperantistoj. Tiuj lingvaj kvaronhoroj estas tre ŝatataj, kaj sinjoro Nylén nun kolektis kelkajn el siaj temoj kaj lia libreto estas envicigita en la scio de Sveda Esperanto-Federacio, kiu trovis plej varman akcepton. La deziro de la verkinto kaj la eldonintoj estas, ke la libro instigu al la grupoj ĉie en la lando (kaj en la tuta mondo) sekvi la ekzemplon donitan. Krome, la libro estas tre valora por studentoj de la lingvo sed precipe por la kursgvidantoj, kiuj sentas bezonon de helpo je klarigo de certaj detaloj kaj bezonas por tio bonajn ekzemplojn.

La infanoj de Betlehem. Selma Lagerlöf. Eld. Soc. Esperanto, Stockholm. Prezo: sved. kr. 0:75.

Unu el al plej alte taksataj verkoj de la sveda verkistino Selma Lagerlöf estas Kristlegendoj. Ĉar la sveda esperanteldonejo havas la intencon en la unua vico eldoni kelkajn aliajn el ŝiaj verkoj, ĝi elektis unu el la plej belaj legendoj kaj aperigis ĝin aparte.

La infanoj de Betlehem estas delikata kaj kortuŝa rakonto pri la venko de bono super malbono.

ENLANDA KRONIKO

Vendrell. — En la kunveno lastatempe okazinta de la grupo «Frateco» oni elektis la jenan komitaton: prezidanto: Francesc Solè; sekretariino, F-ino. Anna Ferrer; vicsekretario, Josep M.^a Riera; kasisto, Anaclet Bergés; bibliotekistino, F-ino. Maria Martorell; voĉdonantoj, Josep Urpi kaj Josep Ferrer. Oni decidis esprimi la kondolencon de la Grupo pro la morto de la honorinda Vendrellano, gloro de Katalunujo, Jaume Carner, eksministro de la Respubliko. La grupo esprimis sian ĝojon pro la apero de la gramatiko de Esperanto «Curs Complet» de Jaume Grau Casas, eldono decidita en la lasta Kongreso de K. E. F. okazinta en tiu ĉi vilaĝo.

Kursoj kontentige okazas en la sidejo de la Grupo kaj en kooperativo «La Reforma». Tiu ĉi lasta disvolviĝas sub la aŭspicoj de la Kultura Fakto de la Kooperativo.

La Propaganda Fakto de «Frateco» publikigis propagandartikolojn en gazetoj de Tarragona, Reus, Valls, Vilafranca kaj en la lokaj ĵurnaloj de Vendrell.

La Ekskursiva Fakto de la nomita grupo preparas ekskursojn al diversaj lokoj kun la celo havigi al la grupanoj amuzajn kaj samtempe edukajn festojn. Ankaŭ oni intencas organizi iun amuzan vesperon en la grupejo. — Jaume Marcè, delegito.

Vic. — Pro la neapero de ĵurnalo «Diari de Vic», sur kies paĝoj ĉiusabate aperadis dum 68 sinsekvaj semajnoj tutkolona rubriko «Esperanto arreu del món», oni sukcesis daŭrigi la saman propagandon sur la paĝoj de «Gazeta de Vich». La teksto, ĉiam interesa, raportas la ĉefajn tutmondajn esperantajn okazintaĵojn.

En la sidejo de Esperanto Grupo Vic komenciĝis nova kurso sub la gvido de la vicprezidanto de la Grupo. Partoprenas ĉirkaŭ dudek gejunuloj, la plimulto nove varbitaj.

Barcelona. — En la sidejo de Paco kaj Amo komenciĝis la unuan de oktobro nova kurso sub la gvido de s-no. S. Alberich. Partoprenas ĝin tridek-ses novaj gelemantoj. La ekskursoj kaj vesperfestoj, kiujn ofte organizas la sama societo, altiras multajn vizitantojn kaj ĉiam regas granda fervoro kaj entuziasmo.

La vigla societo Nova Sento komencis novajn kursojn la 14-an de novembro. La unuagrada estas gvidata de s-no Ra-

mon Puntí kaj la daŭriga de s-no. Francesc Gimenez. Multaj ekskursoj kaj vizitoj altiras la societanojn, kiuj konstante batalas por la afero.

INTERNACIA ĴURNALO ENKONDUKAS ESPERANTON

La semajna ĵurnalo «European Herald» eldonata en Londono kaj ĝis nun redaktata en la angla, germana, franca, hispana kaj itala lingvoj, decidis aldoni Esperanton al la lingvaro uzata. La Esperanta sekcio naskiĝos kun la numero de 28 septembro, kaj redaktos ĝin S-ro. Fred Wadham, L. K. Brita ĉefdelegito de U. E. A.

La enhavo de la ĵurnalo estas interesa por ĉiu Esperantisto, kaj lingvistoj trovos ĝin tre utila. La Esperantan sekcion oni daŭrigos nur, se montriĝos intereso flanke de samideanoj. Okaze de forta subteno, oni pligrandigos la Esperantan parton.

«European Herald» estas vendata de gazetvendistoj en preskaŭ ĉiuj landoj. Tiuj, kiuj ne sukcesas ĝin aĉeti, sendu respondkuponon (poŝtan aŭ de U. E. A.) al «European Herald», 110 Fleet Street, London, E. C. 4.

Artemi Barba mortis. La 21-an de oktobro la malnova kataluna kumbatalanto forlasis nin por eterne. Kun premita koro ni ĉeestis la funebran ceremonion, kiun partoprenis multaj esperantistoj kaj multaj amikoj de la malaperinto. Barba estis granda idealisto kaj en Esperanto li vidis nur la sanktan flamon de la interna ideo kaj por ĝi li donis sin kun entuziasmo ĉiam freŝa. Longe li batalis en la vicoj de la socio Paco kaj Amo kaj en la lasta tempo en tiuj de Nova Sento. Li gvidis kursojn kaj faris multajn paroladojn. Neiel ni povos anstataŭi lin.

Al lia malfeliĉa edzino kaj liaj infanoj, kiuj perdis grandan gvidanton, plenkore ni esprimas nian profundan kondolencon.
